



# TEA-BULTENO

JARO 1ª | FEBRUARO 1998 | NUMERO 1



## AGENDO






| | | |
|---|---|---|
| **1** | **D** | |
| 2 | L | |
| 3 | M | Ordigo de hemeroteko |
| 4 | M | Starto de unuagrada kurso |
| 5 | Ĵ | Unuagrada kurso |
| 6 | V | Novaĵoj el la mondo |
| 7 | S | |
| **8** | **D** | |
| 9 | L | |
| 10 | M | Laboroj/diskutoj |
| 11 | M | Unuagrada kurso |
| 12 | Ĵ | Unuagrada kurso |
| 13 | V | Ekskurso tra vortaro: la birdoj |
| 14 | S | |
| **15** | **D** | |
| 16 | L | |
| 17 | M | Venu por babili! |
| 18 | M | Unuagrada kurso |
| 19 | Ĵ | Unuagrada kurso |
| 20 | V | Kion vi scias pri informado? *(G. Valente)* |
| 21 | S | Komuna vespermanĝo *(Silvio kaj Susy)* |
| **22** | **D** | **SIA en Ljubljana** |
| 23 | L | |
| 24 | M | Laboroj/diskutoj |
| 25 | M | Unuagrada kurso |
| 26 | Ĵ | Unuagrada kurso |
| 27 | V | Aŭstralio *(E. Ackermann)* |
| 28 | S | |







> Esperanto faligos la barojn, kiuj de jarcentoj disdividas la homaron. *D-ro A. Ghez*

## Vortoj de la redakcio

Karaj geasocianoj!

Nova jaro staras antaŭ ni, jaro kies promesoj tute ne konatas, sed kiu jam nun prezentiĝas, por ni triestanoj, riĉa je jam komencitaj viglaj aktivecoj, esperiga je estontaj pozitivaj akiroj, laboriga por tiuj kiuj celas pluan diskonigon de nia lingvo kaj - kial ne? - ankaŭ de nia urbo.

Tutcerte ĉiu el vi jam aŭdis pri KAMPANJO 2000, lanĉita de UEA dum la UK en Adelajdo, kies fundamentaj punktoj tekstas jene:

- Levi la idean kaj organizan nivelojn de la Esperanto-komunumo;
- Levi la prestiĝon de la internacia lingvo;
- Influi la internacian vivon.

Temas pri tre grava laborprogramo, kiu - se profesiece kaj serioze aplikita - povas doni neimageble bonajn rezultojn. Sed por tion klopodi realigi oni bezonas ankaŭ VIN! Por konkretigi tiajn planojn, necesas ĉiuj homfortoj, ĉar nur *unueco estas forto*.

Do, varme vi estas invitataj partopreni en tiu, nepre nepreterlasenda, agado por plifortigi nian movadon kaj atentigi la eksteran publikon pri la mirinda solvo Esperanto, tiel ke, kiam ni transpasos la sojlon de la jaro 2000, ankaŭ ni, esperantistoj de Triesto, rajtos esti fieraj pro niaj kontribuoj al la ambiciaj celoj de KAMPANJO 2000!

Ni atendas VIN! En ĉi tiu 1ª numero de TEA-BULTENO, vi trovos la vesperajn klubo-programojn, la estrarraportojn por la jaro 1997 kaj... do, mem malkovru kion alian!

# Ĝenerala Asembleo de TEA

### dimanĉon la 11an de januaro 1998

## Morala raporto de la Prezidanto

*Edvige Ackermann*

Estimataj gesinjoroj, TEA-anoj, geamikoj!

Jam alvenis la tago en kiu oni devas pripensi kaj mediti pri laboro farita dum 1997 kaj pri la situacio de nia Asocio.

Estis jaro al kiu oni povus doni plurajn adjektivojn: trankvila, laboriga, malfacila, esperplena, doloriga, decida por nia estonta agado.

Trankvila ĉar nenia aranĝo estis organizita, krom la Seminario por instruistoj kiu ne postulis tro multe; laboriga ĉar niaj agadoj disvolviĝis plurkampe kaj konstante ni okupiĝis pri tio kaj tio alia; malfacila ĉar financaj kaj homaj rimedoj por optimuma agado mankas; esperplena ĉar ni startis per organizado de gravaj venontjaraj aranĝoj, en Lignano kaj Trieste; doloriga pro alia foresto inter niaj vicoj; decida por nia estonta agado ĉar ni devis ĉesi la eldonadon de LA ETA GAZETO, kio certe influos ĝin iamaniere.

La klopodoj plivigligi la asociajn programojn ne donis la fruktojn deziritajn: ofte ni devis rezigni la antaŭviditan programon pro manko da ĉeestantoj, ofte nur manpleno da asocianoj vizitis la sidejon.

Tute bone, ĉu ne? Gravas ke la membronombro ne reduktiĝu, ke la asocianoj restu fidelaj kaj venu de tempo al tempo. Tio ĉi gravas, kvankam mi ne tiel rilatas al TEA kaj miaj ideoj kaj deziroj pri funkciado de asocio estas tute aliaj.

Nur en la lastaj du monatoj io moviĝis pozitive: pli da partopreno, pli da homoj interesitaj al diversaj aferoj, pli da asocia vivo.

Neniu volas trudi ion ajn al la aliaj, sed vigla asocia vivo estas alloga, interesa, donas sencon al ekzistado de klubo kiel la nia. La programoj estas preskaŭ deviga agado: ili utilas precipe por praktiki la lingvon kiun ni volus alprenigi kiel la duan al la tuta mondo. Tamen, ni devas esti la unuaj kiuj parolas ĝin, laŭeble bone, kaj kie ni povas lerni kaj ekzerci se ne ĉi tie, en TEA, pere de la vesperaj programoj?

Mi ne volas nun listigi ĉion kion ni plenumis en la jaro 1997, tion faros la sekretario, kaj vi miros kiom da aferoj okazis. Ili postulis tempon kaj laboron por preparo kaj realigo: dankon al tiuj kiuj kunlaboris kaj pretis zorgi pri varia, interesa, kleriga kaj eĉ amuza programo, kaj permesu diri ke tiuj bonvoluloj meritis pli da atento.

Mia raporto estas ĉi-foje tre mallonga: plendoj aŭ riproĉoj aŭ malkontentigo ne multe utilas.

Alproksimiĝas la fino de nia jarmilo: grandaj defioj atendas la esperantistaron, espereble ĝi havos la forton konstraŭstari la nunan tendencon, samkiel TEA espereble havos la forton travivi kaj postvivi la multajn eventojn kiuj aperos ĉe ĝia horizonto. TEA-situacio estas en la manoj de ĝiaj membroj, dependas de ili ĉu ĝi plue vivos, pli-malpli bone, pli-malpli sukcese.

El multaj lokoj oni rigardas al TEA, envie kaj instige, kiel al modela Esperanto-grupo, avangarda kaj iniciatema. Kelkfoje mi provas kontraŭstari tiajn kredojn... ĝis kiam mi konvinkiĝas ke verŝajne la aliaj pravas iamaniere. Poste mi revenas al nia grupo kaj devas konstati ke - malgraŭ ĉio - mia unua opinio estis ĝusta. Ĉu en 1998 ankaŭ mi povos aserti ke TEA estas vere modela ktp ktp?

Antaŭ ol fini, mi volas atentigi vin pri la venontjaraj aranĝoj: la **Alp-Adria Esperanto Konferenco** kaj **Junulara Internacia Festivalo** en Lignano Sabbiadoro dum la Paska periodo (aprile), kaj la **OSIEK-Konferenco** en Triesto meze de julio. Estos ĉiuj tre gravaj por ni, por nia agado en nia Regiono kaj urbo, do, helpo de ĉiuj estos ege bonvena. Sed pli ol bonvena estos via partopreno. Nun estas la momento aliĝi: pripensu rapide kaj agu.

Estu tiu ĉi jarkunveno fruktodona kaj sukcesa: el ĝi eliru nova estraro, forta, agema kaj vigla kiu povu gvidi nian TEA-n sukcese.

# Agadraporto de la sekretario

*Elda Doerfler*

Estimataj TEA-anoj!

Jen denove ĉi tie kunvenintaj por kune rememori la diversajn laborojn plenumitajn de la asocia estraro dum la ĵus finiĝinta jaro 1997[a]. Vi atente aŭskultu por poste tutcele povi kritiki favore aŭ malfavore.

En aprilo, dum 4 tagoj, estis organizitaj ĉe TEA-sidejo, kunlabore kun la Katedro, **Seminario por Cseh-instruistoj** (grado A) kaj **intensiva kurso por komencantoj**.

En aŭgusto/septembro estis gasto ĉe ges-roj Doerfler-Valle la **kuba esperantisto Pedro Enrique Peña Martinez**. Okaze de lia vizito estis konkretigita la ĝemeliĝo kun la Esperanta Filio de KEA en Santiago de Cuba, ekplanita dum ilia restado en Kubo. Dum la teatra vespero de li prezentita, okaze de kiu ankaŭ estis oficiale transdonitaj la dokumentoj pri ĝemeliĝo, vizitis nin ĵurnalisto kun fotisto de la tagĵurnalo IL PICCOLO, sekve de kio aperis ampleksa artikolo pri Pedro, Kubo kaj Esperanto. Plie nia urbestro, Riccardo Illy, sekve de nia peto, transdonis al ni leteron por sia kolego de Santiago, en kiu per trafaj vortoj li emfazis la taŭgecon de amikaj kaj kunlaboraj rilatoj inter niaj du urboj. Al ĝi li aldonis donace libron pri Triesto kaj ŝildon kun la emblemo de triesta komunumo.

En novembro, okazis **ekspozicio de akvareloj** de la esperantisto János B. Tóth, hungara pentristo. La samajn pentraĵojn oni prezentis en decembro ĉe la Libertempa Laborista Asocio de Triesta Ŝparkaso. Ankaŭ tiuokaze aperis artikoloj sur IL PICCOLO kaj IL MERCATINO.

**Ago-tago**, kutime okazanta komence de oktobro, daŭris pli ol unuuran tagon: fakte dum tuta semajno estis videbla en la montrofenestroj de *Libreria Borsatti* ekspozicio de Esperanto-libroj. La 3[an] de oktobro, matene, okazis gazetara konferenco, dum, posttagmeze, publika prezentado de niaj agad-planoj por la jaroj 1997-1998. Venis sufiĉe da publiko kaj ĵurnalistoj poste raportis en siaj periodaĵoj.

Rilate al **enklubaj programoj**, oni klopodis prezenti diversan temaron, kiel eble plej altiran por nia membraro, sed bedaŭrinde la rezultoj estis preskaŭ nulaj, ĉar ĉeestantaro ĉiam estis malmulta. Kelkaj aktivuloj preparis sin por prelegi/raporti pri plej variaj argumentoj, ĉefe kunligitaj al la Esperanto-movado kaj kulturo, sed foje la vespera programo estis nuligita pro manko de aŭskultantaro. Nur projekciadoj de diapozitivoj altiris iom pli da homoj. Kunlaboris en nia strebado al plivigligo de la klubaj vesperoj gesamideanoj Edvige Ackermann, Anita Altherr, Ariella Colombin, Elda Doerfler, Vittorio Malaroda kaj Aldo Viotto.

Se la klubanaro ofte neglektas niajn vendredajn rendevuojn, feliĉe ĝi gratulendas pro la nombra parto-

preno en niaj tradiciaj Esperanto-rendevuoj. La **Semajno de Internacia Amikeco**, en februaro, estis festita niaurbe pere de bongustega tombolo (estu dankata Grazyna Pukacka-Nocent pro la frandindaj dolĉaj artverkoj!), dimanĉa Di-servo, komuna tagmanĝo, projekciado de diapozitivoj en ĉeesto de pli-malpli kvindeko da personoj. Venis geamikoj el Aŭstrio, Treviso kaj Slovenio. En junio oni partoprenis en la **9ª Alp-Adria Esperanto-konferenco** en Crikvenica (Kroatio): krom simple ĉeesti, oni ankaŭ helpis diversmaniere la organizinton de la konferenco, f-inon Marija Beloŝeviĉ, per diversaj kontribuaĵoj al la programo, interalie prezento de video-filmo pruntita de WWF pri la apero de sovaĝa urso en la regiono. Fiaskis, pro la malbona vetero, la septembra renkontiĝo por la **Festo de Amikeco en Arnoldstein**: tamen dudeko da maltimemuloj atingis la supron eĉ piede kaj kunestis kun Martin Stuppnig, malgraŭ ke la festo estis prokrastita por la posta dimanĉo. Modesta, tamen sukcesa la **tago dediĉita al nia Majstro**: la 14an de decembro, matene, pastro Ammer celebris esperantlingvan Di-servon, kaj tagmeze atendis la pli ol 30-personan amikaron abunda kaj tre bongusta tagmanĝo ĉe la Junulargastejo. Venis samideanoj el Kroatio kaj Ljubljana.

Estis organizitaj en majo kaj respektive en junio **ekskursoj** al Farra d'Isonzo, por vizito de Muzeo Ford, kaj tra Slovenio al Kostanjevica kaj Pleterje.

Kiam temas pri **vojaĝoj**, triestanoj ja troviĝas unuavice. Jen kelkaj el la multaj trafitaj celoj: en Italio - Assisi, Bologna, Mantova, Napoli, Padova, Udine, Verona; Rafina (Grekio), Adelajdo (Aŭstralio), Stuttgart (Germanio) k.a.

Daŭras la bonaj rilatoj kun la **lokaj Baha-anoj**, kiujn ni gastigis en marto por tre interesa prelego pri la jena temo: INTERNACIA LINGVO: CELPUNKTO NEEVITEBLA POR LA HOMARO.

Dank' al la klopodoj de nia prezidanto eliri el nia medio al la ekstera publiko, la kontaktoj de ŝi prizorgitaj kun UNESCO-klubo en Triesto rezultigis novembran prelegon de **prof. Giordano Formizzi**, prezidanto de IEF, ĉe *AULA MAGNA* de Liceo *DANTE ALIGHIERI* pri la temo: UNESKO DEFENDE DE LA HOMAJ RAJTOJ, okaze de kiu li menciis ankaŭ Esperanton.

Oni daŭrigas la kunlaboradon kun **Livio Tomini**, kiu en julio, ĉe la Universitato de Koŝice, prelegis pri mikologia toksikologio antaŭ kuracistoj, mikologoj, teknikistoj k.a., kun aparta atento al preventado. Sekve de tio en septembro li estis invitita en Poprad ĉe la Urba Hospitalo por prezenti la saman temon al 13 kuracistoj kaj 3 mikologoj. Ĉie sukcese funkciis kiel pontolingvo la internacia lingvo Esperanto.

Kaj nun iom pri burokrataĵoj: TEA akiris en 1997 nur 8 novajn anojn, sed jam prezentis membriĝdemandilon por la jaro 1998 aliaj 4 personoj. La estraro kunsidis entute 9 fojojn, kaj en februaro okazis unu eksterordinara kunsido pro urĝa decido rilate al aĉeto de nova presaparato. Al ties pago kontribuis malavara mondonaco de tri asocianoj. Ĝi fakte estas tre grava, nemalhavebla instrumento por nia agado: krom presi LA ETA GAZETO, ĝi multobligas cirkulerojn, invitilojn, aliĝilojn, propagandilojn, asociajn leter-paperojn kaj kovertojn kaj, en junio, permesis la publikigon de FOTOGRAFIA FAKVORTARO prizorgita de Giuseppe Valente, 44-paĝa broŝuro kun aldonita diskedo enhavanta anglajn kaj esperantajn ekvivalentojn. LA ETA GAZETO aperis ĉiumonate dum la tuta jaro. Okaze de la centa numero, la redakcio ricevis plurajn gratul-leterojn kaj aperis en kelkaj Esperanto-ĵurnaloj artikoloj enhavantaj laŭdajn vortojn kaj pro la enhavo kaj pro la grafika kompostaĵo kaj ĉefe pro ĝiaj akurateco kaj ĝisdatiĝo.

Nia asocio nun trovis lokon ankaŭ en **interreto**: tie legeblas paĝoj pri Triesta Esperanto-Asocio, prizorgataj de Edvige Ackermann kaj Federico Schreiber. Ankaŭ tio kompreneble postulas laboron kaj tempon.

En 1997 ni ricevis 80 leterojn, dissendis 113, ne kalkulante la multobligitajn cirkulerojn/invitleterojn, faksojn al ĵurnaloj/radioj, k.s.

En aprilo ekestis momenta krizo pro ricevo de letero de nia loĝeja posedanto, anoncanta ĉesigon de nia rajto okupi la ejon. Bonŝance, dank' al marĉandaj kapabloj de nia kasisto, oni sukcesis kontrakti plue, kvankam kun pliiĝo de la lu-kostoj je 35 mil liroj monate por la venontaj 4 jaroj.


En la informad-kampo oni komencis labori kvazaŭ kiel **Esperanto-novaĵagentejo**: nome oni komencis sendi interrete al la naciaj pres-agentejoj la tradukon de la plej trafaj informoj pri nia movado, kiuj povus interesi la eksteran publikon. Tiu ĉi laboro havas subtenon de Itala Federacio: tamen ni ne estas certaj pri daŭrigo de la afero.

Diverstemaj anoncoj/artikoloj estis senditaj al lokaj ĵurnaloj/radio/televizioj dum la tuta jaro, kaj plejparto el tiuj estis publikigitaj/disaŭdigitaj.

Kompreneble oni jam de longe laboradas por la organizado de la 10ª Alp-Adria Esperanto-Konferenco, okazonta aprile en Lignano, kaj OSIEK-Konferenco julie en Triesto. Jam starigitaj la kontaktoj kun urbaj, provincaj kaj regionaj instancoj, dissenditaj la aliĝiloj, skizitaj la programoj, sed restas ankoraŭ multaj farendaĵoj, por kies realigado estos bezonataj multaj homfortoj. Nia junulara grupestro Federico Schreiber estas plene engaĝita en la organizaj laboroj por la okazigo de la Internacia Paska Festivalo en Lignano Sabbiadoro, samperiode de la Alp-Adria Konferenco.

Kaj por fini, jen kuriozaĵo: estis sendita interreta mesaĝo, kiu estis enmetita en kompakta diskedo, alvojaĝanta al luno Titano de planedo Saturno, pere de la spacesplora ŝipeto Huygens. Nia mesaĝo alplanediĝos en novembro 2004: eventualaj eksterteranoj legos la amikecajn salutojn de la triestaj esperantistoj.

En kiu lingvo ni atendu la respondon?



# Raporto de Triesta Katedrestro

*Elda Doerfler*

En aprilo, dum 4 tagoj, estis organizitaj, ĉe TEA-sidejo, **Seminario por Cseh-instruistoj** (grado A) kaj **intensiva kurso por komencantoj**, ambaŭ sub gvidado de prof-ino Katalin Smidéliusz el Szombathely (Hungario). Dek estis la seminarianoj kaj ok la novlernintoj. Rigardata de ajna vidpunkto, la tuto tre bone sukcesis.

La $20^{an}$ de februaro startis unuagrada kurso por 3 personoj, kiu daŭris ĝis la $26^{a}$ de junio. Estis decidite okazigi ekzamenon, post la feria periodo.

La $7^{an}$ de majo komenciĝis alia unuagrada kurso por tiuj kiuj partoprenis en la kurso gvidita de prof-ino Katalin Smidéliusz: ĝi fermiĝis antaŭ la somera libertempado, kaj oni rekomencis ĝin la $23^{an}$ de oktobro, kun 4, tute novaj, lernantoj.

Duagrada kurso startis en aprilo kaj interrompiĝis pro somera feriado fine de junio, por du progresantoj. Oni restarigos ĝin en la nuna monato.

Ĉiulunde okazas konversacia kurso por 5 personoj, kiuj esperebIe iam kuraĝos prezentiĝi por la unuagrada ekzameno.

Unuagradaj kaj konversacia kursoj estas prizorgataj de Maria Rosati, kiu vere estas plaŭdinda pro sia tre fervora sindediĉo al instruado.

Laste, mi memorigas al vi, ke TEA estas organizanta en aprilo ĉijara la $10^{an}$ Alp-Adrian Esperanto-Konferencon, kies temo estas ĝuste INSTRUADO DE ESPERANTO. Ĝiakadre okazos Seminario por instruist/ant/oj kaj porkomencanta kurso, ambaŭ gvidotaj de la fama trejnisto Stefan MacGill. Certe tiu programo meritas ĉies atenton: do, bonvolu mem partopreni kaj propagandi ĝin, ankaŭ inter neesperantistoj.

# Elektoj dum la Jarasembleo

Post balotado, rezultis elektitaj por la jaro $1998^{a}$ la jenaj personoj:


***Estraro***

Ackermann Edvige - *prezidanto*
Zerpini Elena - *vicprezidanto*
Valle Giuseppe - *kasisto*
Doerfler Elda - *sekretario*
Rosati Maria - *komisiito pri instruado*
Valente Giuseppe - *pri informado*
Schreiber Federico - *pri junularo*

***Administraj revizoroj***

Nocent Elio kaj Zerpini Amalia

Al la gvidantoj de TEA iru plej varmajn bondezirojn de bona laboro kaj sukcesa agado favore al Esperanto kaj TEA!



La kasisto, post la konfirmo de sia reelektiĝo, tuj aktiviĝas kaj adresas kelkajn vortojn al la membraro de TEA:

Caro *Samideano*,

finora non abbiamo ancora avuto il piacere di riconfermarti tra i nostri soci. Con ogni probabilità, dati gli impegni ai quali nessuno di noi può sottrarsi, non ne hai avuto il tempo.

La modesta quota annuale è sempre di 40.000 lire che, nel complesso, non coprono neanche le spese di affitto della sede, se non avessimo dei samideani sostenitori che, anche con un modesto contributo, alleggeriscono la nostra posizione finanziaria.

Per tua comodità, anche se preferiremmo la tua presenza, ti allego il nostro conto corrente postale con il quale potrai sostenerci rinnovando la tua iscrizione alla TEA per il 1998.

Scusami se ti ho importunato, ma l'Associazione per potere operare fattivamente alla diffusione del nostro comune ideale, ha bisogno che tutti i soci collaborino per quanto loro possibile, chi presenziando, chi sostenendo: l'importante è essere assieme in un modo o nell'altro.

Arrivederci a presto!

Il cassiere

**Esperanta Turisma Societo Ljubljana**

Tavĉarjeva 2
1000 Ljubljana

**Februara programo**

Ĉiuĵaŭde je la 19.30 horo

**05.02** Kultura Tago: Solenaĵo honore al d-ro France **Prešeren**

**12.02** Jarkunveno

**19.02** Preparlaboroj por **SIA**

**22.02** Amika renkontiĝo kun alilandaj gesamideanoj kaj plezurdona vizito al vidinda alpa regiono: ni ĝuu agrablan esperantan kunestadon!

**26.02** Raporto pri **SIA**-festo

**Amikeco trans limoj**